2e Année. N° 17. Le Numéro : 10 cts. Juin 1912.

# LA DEKSEPA

Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVIIe Arrt
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
**179, Boulevard Pereire, Paris.**

ABONNEMENT : **1 franc** par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVIIe Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

### Notre Diner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu les Mercredis 5 Juin et 3 Juillet 1912, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

### Prochaines causeries.

5 Juin. — Diner mensuel suivi de jeux espérantistes.
12 Juin. — S-ro Henri Germain : Pri Teosofio.
19 Juin. — F-ino Menant : Les Vosges (lumbildoj).
26 Juin. — Akcepto de la Sekcianoj de la XIII-a Kvartalaro.
3 Juillet. — Diner mensuel suivi de jeux espérantistes.

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

# Société Française pour la Propagation de l'Esperanto (S. F. P. E.)

En dehors des 12 membres élus par l'Assemblée des délégués (1), le Comité de la S. F. P. E. se compose de membres élus par les fédérations comptant plus de 500 membres, à raison de un par fédération.

Voici les noms de ces membres ainsi que le nom de la fédération qui les a élu :

MM. Aizière (Féd. de la Région Parisienne) ; Lecorché (Féd. Aube) ; Bord (Féd. Bourgogne) ; Ragot (Féd. Rhodanienne) ; Mlle Desmarest (Féd. du Nord) ; MM. Marly (Féd. Sud-Ouest) ; Ducros (Féd. Normande) ; Esselin (Féd. Centre-Ouest).

Le 25 avril le Comité s'est réuni et a élu pour un an le Bureau suivant : Président, M. Rollet de l'Isle (18 voix) ; Vice-présidents, MM. Cart (17 voix), Boirac (15 voix) ; Secrétaire général, M. Aizière (15 voix) ; Trésorier, M. Robert (14 voix) ; Secrétaire-adjoint, M. Rousseau (Levallois-Perret).

Dans la même séance ont été nommés présidents de commissions :

| | | | |
|---|---|---|---|
| MM. | Bourlet | (16 voix) | Commission de Propagande. |
| | Cart | (18 voix) | Commission de l'Enseignement. |
| | Archdeacon | (16 voix) | Commission de la Presse. |

(1) MM. Durieux, Rollet de l'Isle, Demarcy, Cart, Meyer, Dr Dor, Bourlet, Archdeacon, Boirac, Evrot, Robert et Rousseau (Levallois-Perret).

KONTRAŬ MAR-MAL-SANO

**DELPHININE**

KONTRAŬ FERVOJ-MAL-SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHŒN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : **10 fr.** (**4 $**).

**Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.**

# LA MONATO ESPERANTISTA

En Paris okazis la 14-an de Aprilo la kongreso de la Federacio esperantista de la Paris'a regiono.

En Nice okazis la 24-an de Marto la kongreso de la Federacio Provenca.

Multaj propagandaj paroladoj okázis lasttempe en Condé (Nord), Roubaix, Romans (Drôme) kaj en normala lernejo de St-André de Cubzac (Gironde).

En Limoges la vicprezidanto de la esperantista grupo, S-ro Berland, ĵus fariĝis urba konsilanto.

La nacia angla kongreso okazis dum Pentekosto en Irlando.

En Hispanlando, en Valencia, nova kurso malfermiĝis en malsanulejo; tiu kurso estas farita de medicina studento al liaj kamaradoj.

Novaj kursoj okazis en Tomsk (Siberilando), Astrakan, Lisboa, kaj multaj aliaj urboj.

Tre dokumentita artikolo aperis en la grava monata organo : « Ĵurnalo de la Kuracistoj kaj Akuŝistoj » (70, rue Rochechouart, Paris), de D-ro Lafleur, pri Esperanto kaj ĝia nepra utileco en internacia medicino kaj ĥirurgio.

*
* *

El la gazetaro ni parolos pri rimarkinda artikolo, pri la organizado, de S-ro Hodler, direktoro de U. E. A. Tiu artikolo aperis en « Esperanto » de la 20-a de Aprilo. Jen kelkaj eltiraĵoj :

« ... Ĉu tiu eterna dependeco de tiu aŭ alia malavara riĉulo estas akordigebla kun la fakto, ke tiu institucio estos la organo de la Esperantistaro ? Ĉu la fakto ke tiu lasta nenion aŭ tre malmulte pagas permesas al ĝi interveni en la aferojn de la C. O. kaj decidi pri ĝia agado ? Ni staras do antaŭ tiu dilemo : aŭ la C. O. estos la organo de la Esperantistaro kaj tiam ĝi devas vivi dank'al tiu lasta, kiu rajtos ĝin kontroli : aŭ ĝi estos ĉiam pli malpli en la dependeco de unu aŭ kelkaj personoj kaj anstataŭ servi al la Esperantistaro ĝi tendencos al tio, ke la Esperantistaro servu al ĝi.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Oni petas nian monon ; ĉu oni permesos al ni juĝi kiel ĝi estos uzebla eĉ se de tia ekzameno rezultas malagrablaj konkludoj ?

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Ĉar oni volas premi sur nin realigante la organizaĵon antaŭ la Kongreso, la Esperantistaro havas tre simplan respondon : *nenion pagi* ĝis oni prezentos al ni publikajn kalkulojn, kiuj permesos serioze juĝi la situacion kaj vidi ĉu la mono, kiun oni petas de ni, ne estas plene senutila......... Nia movado ankoraŭ pli bezonas ordon ol ŝajnan pacon, kiu enŝovos nin en marĉon. »

En « Lingvo Internacia », profesoro Th. Cart, parolante pri la diverseco de la naciaj kutimoj, diverseco, kiu malhelpas la funkciadon de oficiala oficejo, diras :

« ... Kaj tiamaniere evitante, ĉar ĝi estus aŭ estos la fonto de neeviteblaj konfliktoj, la kreadon de ia centra leĝdona komitato aŭ estraro ekster kaj super la nunaj organizaĵoj, ni havus en la diversaj cirkonstancoj, necesan internacian unuiĝon, la necesan internacian kunagadon, kaj respektus, ne nur buŝe sed vere, la eĉ en esperantistaj aferoj respektindan principon de la nuna diversnacieco. »

Ĉiu esperantisto, kiu respektas la Fundamenton kaj nur tiun ĉi akceptas kiel internacian leĝon, aprobos plene la lertajn opiniojn de S-roj Hodler kaj Cart. Ĉu novan kotizaĵon ni bezonas ? ĉu novan leĝaron ? certe ne. Ĝis nun, la Fundamento sufiĉis por la lingva fako kaj U. E. A. por la praktika utileco. Ni ambaŭ konservu kaj tion farante ni plivigligos nian propagandon.

ROBERT BOLLACK.


SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

**MAYA BULGARE**

Bulgara Lakta Kazeaĵo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

**Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris.** **Téléphone 214-40.**

# Notindaj datoj

## el la historio de Esperanto kaj de U. E. A.

1859. — Zamenhof Lazaro Ludoviko naskiĝis en Bjelostock (Ruslando-Pollando).

1878. — Zamenhof festis kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la « lingwe universala ».

1887 (Junio). — Apero de la broŝuro « D-ro Esperanto, Lingvo Internacia ».

1889. — Apero de la unua gazeto en Esperanto : « La Esperantisto », en Nürnberg.

1892 (Marto). — Fondo de la Societo « Espero » en St-Petersburg.

1898 (Januaro). — Fondo de la Societo por la propagando de Esperanto en Franclando (S. F. P. E.)

1899. — La raporto « La Lingvo Internacia » de E. Naville estis prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.

1901. — Generalo Sebert kaj Charles Méray prezentis Esperanto al la Franca Akademio de la Sciencoj.

1902. — Fondo de la Svisa Esperanta Societo.

1903. — Fondo de la Hispana Societo por la propagando de Esperanto. Fondo de la Brita Esp. Asocio (B. E. A.)

1905. — Unua internacia kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

1905. — Akcepto de la Deklaro pri Esperantismo.

1905. — Elekto de Lingva Komitato (L. K.)

1906. — Dua internacia kongreso de Esperanto en Genève.

1906. — La dua kongreso de Esperanto aprobis la proponon de S-ro Carles pri la kreo de « konsuloj ».

1906. — Fondo en Braunschweig de la Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)

1907 (Februaro). — « Esperanto », la nuna oficiala organo de U. E. A., reaperas sub la gvidado de H. Hodler.

1907 (Majo). — R. de Saussure publikigas la internacian monsistemon (spesmila sistemo).

1907. — Tria internacia kongreso de Esperanto en Cambridge.

1907. — Dum la tria Esperanto-kongreso, la konsuloj kunvenis en specialan kunsidon.

1908 (1-a de Majo). — Oficiala fondo de U. E. A., provizora elekto de delegitoj.

1908. — Kvara internacia kongreso de Esperanto en Dresden ; unua kunsido de U. E. A. dum la kvara kongreso.

1908. — Th. Rousseau instigis la kreon de Esperanto-oficejoj.

1909 (Majo). — Fondo de Ĉekbanko Esperantista per C. F. Höveler (Ĉefeĉ).

1909. — Kvina kongreso internacia de Esperanto en Barcelona ; dua kunsido de U. E. A. dum la kvina kongreso.

1909. — Fondo de Universala Esperantia Librejo kaj eldonejo.

1910 (Julio). — Malfermo de la unua kongreso de U. E. A. en Augsburg.

1910. — Sesa internacia kongreso de Esperanto en Washington.

1910. — Unua kongreso de la katolikaj esperantistoj en Paris.

1910 (Novembro). — Unua elekto de la Distriktaj delegitoj de U. E. A.

1911. — Sepa internacia kongreso de Esperanto en Antwerpen.

1911. — Malfermo en Antwerpen de la dua kongreso de U.E.A.

(El la Jarlibro de U. E. A. 1912.)

# INTER NI

Samtempe kun la parolado pri Serblando de nia samideano Klajiĉ, ni estis agrable surprizitaj de la vizito de dek Nederlandaj esperantistaj Fervojistoj, el diversaj urboj.

☆

Ĉe la festo de la « Dek-Sepa » ĉeestis inter multaj aliaj, S-ino Tiard, prez. de la Provenca Federacio, S-ino Farges, el Lyon, S-ino Vallienne, S-roj Th. Cart, Frechas... kaj mi.

☆

Nia simpatia kaj fervora sekciano H. Nonin, ĵus forveturis Anglolandon. Niajn plej sincerajn bondezirojn kaj bonan sukceson.

☆

Okaze de la terura morto de S-ro W. T. Stead, sur la « Titanic », kondolenca letero estis sendita al la funebranta familio, de la tuta Sekcio.

FUŜISTO.

# LA AŬTOMOBILAJ EKSKURSOJ DE « LA DEK-SEPA »

Nia proksima ekskurso okazos la 16-an de Junio al « Louviers » por ĉeesti la kongreson de la Esperanta Normanda Federacio. La akcepto okazos ĉe la Hotelo de l'« Mouton d'Argent », apud la preĝejo. La fiksita prezo estas la sama kiel por Amiens, t. e. *10 fr. popersone*.

Tre certe ĉiuj, kiuj ĉeestis nian unuan promenadon, ne mankos aliĝi al la aliaj, tiel agrablan memoron ili konservos de tiu rava promenado. Sur la tuta vojo ni faris aktivan propagandon, kaj niaj flirtantaj standardoj altiris ĉie la atenton de la trapasitaj vilaĝoj.

Pro serioza motorhaltado, ni devis halti en **Beauvais**, kie la grupo atendis nin kaj kun vera tuŝanta afableco akceptis kaj gvidis nin por viziti la vidindaĵojn de ilia interesa urbo.

S-ro Demarcy, la simpatia prezidanto de l' tiea grupo, adiaŭis nin per la sekvantaj vortoj :

« Ni multege kompatas viajn malagrablaĵojn. Sed ni preskaŭ estas kontentaj pri tiuj, nun kiam dank' al ili ni povas pli longe fari societon al vi. Estas efektive al mi tre agrable revidi vin. Ni ne estas forgesintaj la bonan viziton, kiun vi bonvolis fari al ni la lastan jaron. Ni precipe memoras, ke per tiu vizito vi volis pruvi al ni vian simpation en malfacilaj cirkonstancoj.

Permesu al ni profiti la okazon por denove rediri al vi, ke, kiel vi, ni estas tute konvinkitaj, ke nur la fideleco al la Fundamento povas certigi la sukceson al Esperanto.

Kaj nun ni deziras al vi bonan reiron kaj ekkrias kun vi : Vivu la fundamenta Zamenhofa lingvo ! »

☆

## Nia tria Ekskurso al « Fère en Tardenois ».

La dato fiksita estas la 7-a de Julio. Tiu ekskurso estos vera regalo por fervoraj turistoj, ĉar la diletantoj de l' bela naturo, kiel tiuj de artaj kolektoj, ĝuos plengrade tiun tagon ambaŭ sensaciojn.

---

Por aliĝoj al la du supre cititaj ekskursoj, sin turni al S-ro Henri de Coppet, 179, boulevard Pereire, Paris.

# Nimfaj Ŝtonegoj.

De ELIN-PELIN.

*(Daŭrigo kaj fino.)*

Sed Magdaleno trankvile paŝtis la brutaron de sia patro kaj, ŝajnas, eĉ ne atentis la junulojn, kiuj freneze postkuris ŝin kaj konstante ŝin sekvadis kaj renkontadis kun la brutaroj en la sovaĝaj arbaregoj. Tio estis terure ĉagrena por la junaj koroj. Kaj iun nokton iu nekonata ekbruligis la dometojn de ŝia patro kaj flamoj lumigis la tutan monton. Sed tio ne timigis ŝian patron. Li trankvile respondadis al ĉiuj:

— La perforto al fremda koro estas pli terura. Mi ŝin amas kaj mi permesas al ŝi, ke ŝi mem elektu al si kunulon.

Ne postlonge, iun matenon, li trovis en la brutejo senkompate elbuĉita sian tutan brutaron. Sango verŝiĝis sur la koron de la maljuna montano. Indigno kaj turmento plorigis ian maljunan animon. Li ĉirkaŭprenis sian preskaŭ mortantan de malĝojo filinon kaj diris:

— Vi ne malĝoju, via patro ne koleras kontraŭ vi. Tio estas nenio. Sed mortigi la volon en la koro de la homo, tio estas plej terura krimo. La elektota de vi bravulo, estos ankaŭ de mi elektita.

Longe pensis Magdaleno. Ankoraŭ infano, ŝi kreskis kun la al neniu konfidenciita revo por vidi de la supro de la nealireblaj ŝtonegoj la maron, en kiu sin banas la fajra suno. Ankoraŭ malgranda, ŝi ne povis rigardi sen plej kuraĝaj deziroj tiujn neatingeblajn altegaĵojn, kaj eble tio estis ekbruliginta en ŝiaj okuloj tiun mirindan fajron, kiu venkadis kaj fajrigadis ĉiujn korojn. Kaj, ĉar la junuloj freneze kuris post ŝi, ŝi foje diris:

— Mi edziniĝos je tiu, kiu min alkondukos sur la supron de tiuj ŝtonegoj.

La junuloj, por sin savi de la honto pro sia senforteco, komencis ŝin kulpigi, ke ŝi estas superema kaj fiera, ke ŝi havas kapricojn kiel ĉiuj belulinoj. Sed ŝi neniam montris elŝajnon, kiu povus pruvi, ke ili estas pravaj. Tio ankoraŭ pli flamigis ilian deziron por ŝin havi. Sed kiu povus atingi la

neeblon? La senforteco ĵetis en iliajn animojn ĉagrenon kaj malesperon.

Inter ĉiuj nur unu ne malesperiĝis.

Li estis gracia, bela junulo, kun alta frunto, kun nigraj okuloj kaj brila rigardo, kun fiere levita kapo. Li ne ĉesis sekvi Magdalenon kaj ŝtelpreni ŝian kronon el primolo.

— Magdanjo, — diris li al ŝi, -- vi vidas, ke mi amas vin; liberiĝu de via senpripensa deziro, kiu pereigos nin ambaŭ. Ankaŭ sen tio ni estos feliĉaj....

— Ne povas esti feliĉa tiu, kiu ne povis realigi siajn revojn, kun kiuj oni elkreskis, — respondis Magdaleno kaj montris per fingro la starantajn en la blua ĉielo ŝtonegojn.

— Mi ne timas, mi ankaŭ tien vin alkondukos! — respondis malĝoje, sed kuraĝe, la bela junulo, en kies koro, kiel filo de sia tempo, same tiel brulis deziro por aliri supren.

— Kaj tiam mi vin amos kaj estos via — respondis tremanta de dolĉaj esperoj Magdaleno.

— Sed se ni pereos?... — demandis la junulo.

— Ni pereos kune, — respondis ŝi kaj demandis: — sed se vi ne povos min alkonduki supren?

— Se vi suspektas, vi eĉ ne ekiros. Sed dume vi estos kun mi, mi ĉiam havos forton bataladi kontraŭ la danĝeroj kaj venkadi.

Je la morgaŭa tago bele vestita, kiel por edziĝofesto, popolo alkuradis el ĉiuj suproj kaj vilaĝetoj al la herbejego, sub la nesurirebla supro, por adiaŭi Magdalenon kaj ŝian bravan amanton, ekirintaj en nekonatan vojon.

— Sensaĝulo! — lin riproĉis la maljunuloj. — Pro virino vi vin ĵetas en danĝerojn!...

— Pro amo, ne pro virino! — respondis la junulo.

— Magdaleno, se al vi ne estas kara la vivo, almenaŭ ne faru viktimo alian! — kriis kelkaj al la kapricema junulino.

— Sed se mi vidos la mirindan maron? — respondis ŝi.

— He, tiam kio?...

— Kio?! Mi akiros tion, kion vi ĉiuj estas dezirantaj.

— Kaj alion?...

— Kial mi bezonas alion plie? Tio estas ĉio!

Kaj kaptinte sin kun la junulo je la manoj, ili ekgrimpis sur la krutaĵon.

Kun haltigita spiro la vilaĝanoj malsupre de la herbejego observis, kiel la paro transsaltas arbetaĵojn kaj ŝtonojn,

kiel grimpas sur la terruinojn kaj kun kia peno ili serĉas sur la ellavitaj de la pluvoj rokoj apogon por siaj piedoj, kun kia ĝentileco kaj atento la junulo apogadis sian kunulinon kaj ŝin kondukis al la nuboj.

Kiam Magdaleno ekhaltis por ripozi, li ĉirkaŭiris por trovi traireblajn lokojn, amasigadis ŝtonojn por fari ŝtupojn, fleksadis arbetajojn, por havi kion ekkapti ĉe la suprengrimpado kaj lacigita li revenadis kaj denove ŝin kondukis supren. Ili eniris en abismojn kaj longe malaperis el la vido de la vilaĝanoj, kiuj klinis kapojn kun timo por ne tralegi unu al la alia en siajn okulojn, ke tie supre estas okazinta io terura. Sed jen ke la brava junulo denove montriĝas pendanta super la abismoj kun sia kara kunulino en brakoj.

Tiamaniere ili elgrimpis tiom alte, ke ili ne plu estis videblaj. Sed la pintoj de la danĝeraj ŝtonegoj estis ankoraŭ tre alte.

*

* *

Longaj jaroj estas pasintaj de tiam, sed Magdaleno kaj ŝia kunulo jam ne revenis.

Kaj ĝis hodiaŭ neniu scias, ĉu ili estis atingintaj la supron de la nealireblaj ŝtonegoj. Sed ĉiuj rakontadas kaj miras tian amon, kiu inspiris tian kuraĝon.

*Kun permeso de l'aŭtoro, el bulgara lingvo tradukis*

N. Ĥristoskoff.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

# LA VERA TIZANO DE L'PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : **1** Fr. **50** (Sm. **0,60**)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

**Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.**

# JUBILEO DE ESPERANTO

La 2-an de Junio 1887 aperis la unua broŝuro pri nia kara lingvo sub la titolo: « D-ro Esperanto: Plena lernolibro kun antaŭparolo kaj kun du vortaroj. Por rusoj. Prezo 10 kopekojn ».

Do, la 2-a de Junio de tiu ĉi jaro estas gravega kaj signifoplena dato por nia senhalta movado antaŭen: en tiu ĉi tago finiĝos *la 25-a jaro de ekzistado de l' lingvo internacia Esperanto.*

Kaj jen por inde kaj solene noti tiun multvaloran kaj memorindan por ni daton, ZAMENHOFA ARTISTA ADEPTARO aranĝos **grandan Jubilean Koncert-Feston,** en kiu, krom niaj konstantaj muzikistoj, kantistoj kaj deklamistoj-Z. A. A.-anoj, partoprenos *la orkestro de mandolinistoj el tridek personoj* (la « Estudiantina Cœcilia »), sub la direktado de nia samideano S-ro *A. Besnard,* kaj nove fondita ĥoro de Z.A.A.

La Koncerto okazos la **2. de Junio** (dimanĉe), je la 8 1/2 vespere *precize,* en la festsalonego de l'**Mairie du 5e Arrondissement** (place du Panthéon), sub la honora prezido de S-ro Rollet de l'Isle, prezidanto de S. F. P. E., kaj sub la efektiva prezido de S-ro Th. Cart, vicprezidanto de S. F. P. E.

La eniro estas senpaga.


## Muzikeldonejo A. BESNARD

**26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS**

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj, violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.
Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

**SENSACIA NOVAĴO !!! ESPERANTAJ DISKOJ !!!**

| | | |
|---|---|---|
| KANTOJ | **La Espero** . . . . . . . | L. L. ZAMENHOF |
| | **Al vi** . . . . . . . . . . | BEMBERG |
| DEKLAMOJ | **Preĝo sub la verda standardo** | L. L. ZAMENHOF |
| | **Blanka vualo** . . . . . | V. DEVJATNIN |

*Ĉiu duobla disko:* **4 fr. (1,600 Sm.)**

**Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.**




*Vera Ferhava Salo alsimiligebla*

ELTROVITA DE

**M. Maurice ROBIN**

en 188

# LA Fer Robin

*mirinde efikas*

KONTRAŬ

SENSANGECO,
PALKOLORECO,
SANGELFLUOJ

ĈIUSPECAJ

**Akcelas la nutradon kaj neniam mallaksigas.**

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu manĝo, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
**POSTULU la nomon de ROBIN**

VENDEJO POGRANDE :
**13, Rue de Poissy, PARIS**

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : E. OLLIVIER.